EBEN-EZER

La TURO

EBEN-EZER, la helpa ŝtono.

Eben-Ezer estas limŝtono. La turo stariĝas por rememorigi al la homaro la liberiĝon kiu devas okazi.

Ĝi situas ĉe strategia krucvojo kie Belgio, Germanio kaj Nederlando apudestas.

Tie pasis ĉiuj armeoj de la Historio, flirtis ĉiuj militaj flagoj, resonis la klaktintadoj de armiloj kaj la tondroj de kononoj, brulis la vilaĝoj kaj la rikoltoj.

La armeoj de Julo Cezaro, de la Frankaj reĝoj, de la feŭdaj nobeloj, de la Hispanoj reĝoj, de la Francaj reĝoj, de la princoj kaj de la imperiestroj, invadis kaj starigis ĉi-tie kaj alportis ruinigon kaj teruron.

La 4-an de aŭgusto 1914, la armeoj de Kaiser venis ĉi-tie.
La 10-an de majo 1940, la armeoj de Hitler perforte ekokupis la fortikajon de Eben- Emael.

Sur la batalkampoj ĉiutempaj, Eben-Ezer estas limŝtono, la limŝtono de paco.
Eben-Ezer estas bastiono de la Espero, la bastilo de la pacifistoj kiel lumturo supre de la valo de Geer.

Eben-Ezer estas templo de la paco. Pafilo rompita estas enmasonigita apud la eniro. Supre staras la bestoj de l'Apokalipso.

La turo estas konstruita per siliko-ŝtono. Siliko estas vivanta ŝtono laŭ la aŭtoro – filosofo Roberto Garcet.

Oni trovas tiun materialon surloke en la geologiaj tavoloj. Tiu ŝtono estas la fundamento de arkeologio kaj la multvalora ŝlosilo de la tuta homa industrio.

Ĉu Eben-Ezer estas arto ? En plena suno aŭ sub la blaŭa lunheleco, la ŝtonoj parolas.

Eben-Ezer, kiel nova akropolo, akcentas la belecon, la pacon, la poezion.

Arto estas efika armilo por pacifistoj. Per arto oni povas plej bone atingi la veron kaj mallaŭdi la stultecon.

Ĉu la kvar keruboj de l'Apokalipso ne estas aŭdaca kulmino ? Per mirakla ekvilibro, ili rezistas al ventoj kaj al la ŝtormoj.

La unuagrada lernejo

La ŝuoriparejo

La Eben muzeo estas

alirebla nur laŭ rendevuo.

Maksimume 15 personoj.

Freddy kaj Nicole CLOSE

Rue du Geer, 14

B-4690 Eben-Emael

Tel : 00-32(0)4-286 27 90

E-mail : ebenmusee@gmail.com

LA EBEN MUZEO

Prezentas aron da konstruaĵoj integritaj en la kampara pejzaĝo.

Tie vi malkovros la ĉiutagan vivon de la pasinteco.

Garbejo kaj remizoj

Forĝejo

La bakforno

La butiko

La ĉapelfabriko

La laktejo

La sekcio pri arto kaj arkeologio

Modesta domo de 1801